Eŭropo Demokratio Esperanto

# Egalaj antaŭ voĉdonilujoj

11an de oktobro 2009

Dum la lasta franca EDE-somera universitato, partoprenantoj elpensis la ideon civitane agi por peti harmoniigon de la voĉdonprocezo kaj kandidatiĝkondiĉoj (precipe laŭ la germana modelo) en ĉiuj landoj de EU. Ĉi-sube, jen teksto el pensado pri tio, kion implicus tia faro el la agadvidpunkto kaj kia estus nia interesaro preter hipotetika finvenko (ne pri enkonduko de Esperanto sed pri harmoniigo). Tio kio kuŝas surpapere malsupre respegulas nur ion el la plej ambicia vidpunkto, sen konsideri tiajn, kiaj reale estas niaj rimedoj, por ne bremsi cerbumadon je la unua pensŝtupo pri la projekto.

## Agadplano:

### Prepara agado / Pripensado

Kiun celon ni alstrebu? Kiuj estas voĉdonmanieroj kaj balotleĝoj en ĈIUJ aliaj membro-ŝtatoj (informiĝi pere de nia kontaktula reto aŭ el oficiala fonto). Redaktado de nia peto (ĉu petskribi kadre de la popol-iniciativa referedumo kiun starigos la traktado de Lisbono post ties ekaplikiĝo?), opinio de juristoj. Tradukado en ĉiujn oficialajn lingvojn de EU. Alvoko al mondono por lanĉi agadon (profiti EDE-francan impostrabaton por ekhavi financrimedojn).

### Konsistigo de naciaj skipoj

-Interna komunikado ene de la esperantlingva movado por varbi naciajn kunordigantojn.
-Presado de specifaj faldfolioj por klarigi nian agpaŝadon (demarŝon) al esperantlingvanoj.

### Partnereco

-Serĉado de partneroj ekster esperantio por krei bazan agkolektivon en kelkaj landoj (Francio, Germanio, kun grandaj aŭ etaj partioj, sindikatoj, asocioj por civitaneco...)
-Kreo de kolektivo au asocio dediĉita al la projekto

### Aktiva komunikperiodo

-Kreo de plurlingva retejo projektdediĉita pri nia agado kaj kolektivo
-Kreo de komunikmaterialo (reklam-objektoj, gluŝildoj, varbfaldfolioj...)
-Kontaktiĝo kun politikaj aliaj aktoroj pere de niaj kontaktuloj en ĉiuj EU-landoj
-Subtenantaj organizaĵoj kolektu subskribojn de siaj membroj, kiujn ni kunigos
-Prigazetarumo de la subskribkolektado (ĉu per europa turneo de kolektveturilo?)
-faro de ĉia favora ago por paroligi pri la agado...
-transdono de petskriboj al oficialuloj

## Interesoj por EDE

Finrealigi tiun agadon havos multajn avantaĝon por nia movado, unue por ebligi al ni varbi novajn aktivulojn kaj krei kaj strukturigi nian EDE-eŭropan reton. Tiu agado evitos al ni duondormi movadskale ĝis 2014 kaj ebligos flegi kapitalon de simpatio por la proksimaj eŭropaj balotoj. Ĝi ebligos konatigi EDE kaj Esperanton ĉe ĉiuj politikaj organizaĵoj aŭ ĉe asocioj implikitaj en konstruado de la Unio. La prigazetarumo de la projekto (atentu pri famec-deturno far alia organizaĵo kaj atentu ne montri nin pli gravaj ol nuraj iniciatintoj) ebligos krei al EDE publikan bildon pri civitaneca kaj aktiva organizaĵo. La agado ebligos ankaŭ konigi nin en la gazetara kaj asocia mondo kaj akiri komunik-sperton kaj -kompetencojn movadskale. Pere de kolektivo, ni povos transpasigi niajn ideojn al partneraj organizaĵoj kaj disvolvi influ-reton. La agado ebligos al ni ankaŭ referencigi esperantlingvanojn jam enplantitajn en aliaj partioj, kiuj povos peri la projekton kaj la subskribkolektojn. Bona interreta kampanjo, filmeto en Esperanto kun komentoj en Esperanto kaj intervjuo kaj subtekstoj en pluraj lingvoj kontribuos al tio, se ne konigi EDE almenaŭ konigi Esperanton en la influmedio. La unuopan petskribfolion mem oni povus verki ĉiam en iu oficiala lingvo de EU (tiu de la subskribonto) + en Esperanto kaj tiel oni reklamos pri Esperanto ĉe ĉiu subskribanto.

Ideoj kunigitaj de Fabien Tschudy